– eldoni kun la samaj, nur fote malgrandigitaj paĝoj. La dikeco de la volumo restas (se la papero ne povas esti pli maldika). Kaze de ĉ. 80%-a malgrandigo, la libro estos pli aŭ malpli samvoluma kiel PIV. Sekve la libro estos similfacile manipulebla kiel PIV;

– se oni povas senfote rekte presi de la komputila disko, estas inde refari la enpaĝigon de NPIV sur samgrandaj folioj kiel PIV, kaj per konvena malgrandigo de la literoj oni povas atingi la dimension de PV! Laŭ la menciita ekzemplo de DSI, kiun mi mem fojfoje kutimas uzi, eĉ literoj kun 62%-a malgrandigo estus bone legeblaj! Sed mi proponas 70%-an malgrandigon kiel ne ekstreman. Studentoj ĉie en la mondo uzas tiaspecajn dense presitajn vortarojn.

Do la **popola NPIV** aliĝu al la triumfmarŝo de la **luksa NPIV**!

### Noto:

Jena artikolo, kun iom pliampleksigita teksto kaj dividite en du apartajn artikolojn, samtempe aperas ankaŭ en Debrecena Bulteno, n-roj 132 - 133.

### Adreso de la aŭtoro

*Prof. emerit. Dr. Ottó HASZPRA*
*Húr u. 9A. III. Iph. 1/3*
*HU - 1223 Budapest*
HUNGARIO
*<haot@freemail.hu>*

### Priaŭtora informo

La aŭtoro estas diplomita konstruinĝeniero kaj membro de pluraj sciencaj akademioj, verkis plurcent sciencajn studojn, librojn k.a., kaj prelegis en sciencaj institucioj kaj konferencoj.

Ekde 1959 profesoro *Haszpra* laboras ankaŭ por la scienca aplikado de Esperanto, redaktis la Sciencajn Komunikaĵojn kaj la sciencan materialon de la Hungar-Esperanta Mezvortaro, kaj estas nun *Professor emeritus* de Budapeŝta Teknika kaj Ekonomika Universitato.



# La invado de la Romianoj en Britujo

*Gerhard KALKHOF*

## 1. La antikva mondo kaj Britujo

### a) La mediteraneaj kulturo kaj ekonomio

Retrorigarde serĉante la lulilon aŭ komencon de sia propra kulturo, la Eŭropanoj sin direktas al la mondo ĉirkaŭ Mediteraneo, la maro inter la kontinentoj Eŭropo, Azio kaj Afriko, kaj precipe al la regiono orienten, la tiel nomata "fruktodona duonluno". Komence de la antikva epoko tie vere evoluis apud grandaj riveroj alte kulturitaj ŝtatoj: Egiptio ĉe Nilo kaj la lando inter la riveroj Eŭfrato kaj Tigriso, Mezopotamio (la nuna Irako); Sumerio, Babilonio kaj Asirio, inventintaj skribadon kiel fundamenton de ĉia ŝtateco kun riĉa kultura vivo kaj scienco.

Sed tiuj ŝtatoj restis nelonge solaj. Sekve de politikaj antagonismoj pro reciproka konkeremo kaj potenc-strebado novaj popoloj aperis el nebuleca pratempo por profiti el la kulturaj valoroj. La interŝtatajn problemojn plej ofte solvis milito. La kulturo transherediĝis al aliaj eŭropodevenaj popoloj kaj fine disvastiĝis trans la limojn de Mediteraneo pli kaj pli okcidenten.

Multaj popoloj apartenis al la proceso, transformante la egiptajn kaj mezopotamajn ŝtatkulturajn elementojn laŭ siaj bezonoj, kiel ekzemplo kvar el ili kiuj daŭre plialtigis la kulturriĉecon: la Persoj, la Fenicoj, la Grekoj kaj fine la Romianoj. Malgraŭ ĉiuj diversecoj (ĉu pri la koncepto de la ŝtato, ĉu pri ties ekonomia bazo) esence tamen ĉio konsistis el du elementoj: sklaveco kiel ekonomia fundamento (kaj fakte karakterizo dum la tuta antikva epoko) kaj navigado. Tio ebligis la esploron de la Mediteranea regiono, de la oriento ĝis la malproksimokcidenta fino je la Kolonoj de Herkulo. Precipe la Fenicoj kaj Grekoj elstaris per navigadaj entreprenoj. Alie la Romianoj: ili restriktis sin antaŭ ĉio al landokupado, kvankam ili ne povis neglekti la navigadon por establi sian ĉirkaŭmediteranean imperion.

**b) Scio pri Britujo**

La regionoj ekster tiu kultura influsfero estis tute malkonataj. Tiutempe oni ja pensis, ke la mondo estas disko, kies centro konsistas el tera unuformeco, nome la tri kontinentoj Azio, Afriko (la tiama Libio) kaj Eŭropo – kaj el la meza maro Mediteraneo, ĉirkaŭita de la pramaro "Okeano". Transpaŝi la diskorandon oni devis eviti, ĉar oni riskis fali en abismon – fajroplenan submondon de Hadeso. Tiun konvinkon pravigis, ke ŝipoj transvelantaj la Kolonojn de Herkulo estis minacataj de hororaj ŝtormegoj sur la vasta Okeano.

Malgraŭ ĉiuj danĝeroj, unuopuloj tamen riskis veli pluen. Precipe la Fenicoj esploris la malkonatejon, palpante sin laŭlonge de la marbordo, parte suden, iom post iom ankaŭ norden – eble eĉ ĝis la Germana maro. Ili iam atingis eĉ grandan insulon en la norda maro, kie troviĝis erco, bezonata por gisi la bronzon: tio estis grava metalo por armiloj kaj multaj objektoj de ĉiutaga uzado. Ankaŭ stano troviĝis sur tiu nordmara insulo, kiun ili nomis Britujo – precipe sur ties duoninsulo Kornvalo.

La Fenicoj, lertaj navigadkomercistoj, ofte transportis stanercon de tie al siaj mediteraneaj hejmlandoj (precipe al Kartago kaj Tirio); tamen la norda regiono restis preskaŭ nekonata. Tro malproksima, tro danĝere atingebla, la norda parto kun la insulo Britujo estis ekster la orbito de la tiutempaj homoj. Ili ne interesiĝis pri ĝi.

Tiu situacio ankaŭ ne ŝanĝiĝis, kiam (ĉ. 350 a.K.) la greko Pitiado (*Pythias*) el Masilio (hodiaŭ: Marsejlo en Francujo) grandskale velveturis la nordan maron, ĉirkaŭanta tutan Britujon ĝis Norvegujo, kaj velanta laŭlonge de la germana marbordo. Sed tiu aŭdaca velvojaĝo tute ne gravis, se entute rimarkite – nur unuopaj historiistoj estis notintaj ĝin. La homoj de la antikva epoko direktis sian atenton sole al la mediteranea, pli proksima regiono.

**c) La britaj keltaj triboj**

La antikvatempaj homoj ne interesiĝis pri Britujo, ne nur pro ties fora, abismodanĝera situo, sed ankaŭ pro la (laŭdire) hida aspekto de ties loĝantaro. Mankis ja tie ĉiu ajn kulturo laŭ civilizado kaj mediteraneaj moroj; la homoj tie ŝajne nur konis agrikulturon kaj bestobredadon – kaj fari militon. La diversaj triboj ofte interbatalis, rabis kaj masakris sin reciproke. Komunecon ili nek konis, nek volis.



Lando kaj popolo estis sinistraj. Dum ili sole regis sian insulon, tio ja ne gravis. Bone armitaj invadantoj certe povus facile venki ilin. Tamen la britaj triboj apartenis al granda popolo, loĝanta ankaŭ en aliaj partoj de Eŭropo: la Keltoj. Dum pli frua epoko ili vivis transe de tuta Eŭropo – de fora Irlando ĝis Britujo, meza Eŭropo, ĉirkaŭ la Alpa regiono, precipe en nunaj Francujo, suda Germanujo kaj norda Italujo trans la balkanaj landoj ĝis eĉ Turkujo.

Kvankam ĉiuj keltaj popolpartoj disponis pri komuna kulturo religia kaj lingva, ili neniam strebis al nacia aŭ ŝtata unuiĝo - ĉar liberecon ili ŝatis pli ol ĉion alian. Ilian vivmanieron karakterizis agresemo, kverelemo kaj aŭdacemo. Ĉiuj najbarpopoloj suferis pro tio – ankaŭ la romianoj.

La tribaj nomoj variis laŭregione. En Francujo ili nomiĝis "Galloj" aŭ "Belgoj". La komuna nomo de la triboj sur la brita insulo estis kompreneble Britoj, kaj ilia komuna lando do Britujo. La ĝeneralan nomon "Keltoj" aŭ "Celtoj" estis donintaj la grekoj.

En la pli granda Britujo ekzistis plej diversaj triboj: en la sudo la Trinovantoj, Kantioj, Katuvelaŭnoj, Atrebatoj, Belgoj, Durotrigoj, Icenoj; okcidente en Kimrujo la Ordovicoj kaj Siluroj; norden – en meza Anglujo – la iom rabemaj Brigantoj.

La nordan parton de Kaledonio regis la Selgovoj, Damonioj, Novantoj, Karnonacoj kaj aliaj. Pli poste en Kaledonio aperis la tre militemaj Piktoj kaj la Skotoj. Ĉiu tribo havis sian propran reĝon (aŭ reĝinon) kaj ĉiam inklinis plivastigi la regadon sur najbaraj triboj – laŭ plezuro aŭ laŭ kverelemo.

**d) La Romia imperio**

Tiu artikolo ne celas, laŭvice kaj precize raporti pri la formiĝo kaj disvastiĝo de la mediteranea kulturo dum periodo de pli ol du jarmiloj. Rilate al Britujo sole unu regno gravas: la Romia Imperio, kiu fakte finis grandiozan antikvan epokon kaj origine centriĝis ĉirkaŭ la urbo Romo. En la ĉirkaŭa tereno nur la romiaj urbanoj disponis pri potenco kaj regadebleco. Fondite en nebuleca pratempo (laŭlegende en 743 a.K. de *Romulus* kaj *Remus)* ĝi akiris pli kaj pli da potenco en Italujo jam ekde la 3a jarcento a.K.

Per lerta politiko, samrajtigante siajn italajn urbojn kaj tribojn kiel aliancanojn aŭ asocianojn (lat. *socii* ) la burĝoj de Romo (lat. *cives romani*) establis fortan regnon, loĝatan de romi(an)oj, kiuj komencis

konkeri ĉiujn teritoriojn ĉirkaŭ la Mediteraneo. Kontraŭe al la antaŭe ekzistintaj popoloj, la romianoj ne limigis sin al fondado de unuopaj fortikigitaj koloniejoj en diversaj bordolokoj de la maro favore al komerco kaj navigado, sed ili strebis regi tutajn landojn aŭ ŝtatojn, perforte respektive militire aŭ eble aliancante; la tiel akiritajn landojn ili nomis "provincoj" (lat. *provinciæ*), t.e. venkolando, venkita lando.

Tiun politikon la romianoj faris ekde la 2a jarcento a.K., unue gajninte partojn de la orienta mediteranea regiono en Malgranda Azio, la nuna Turkujo, en la balkana duoninsulo, precipe Grekujo, kaj poste la insulon Sicilio. De tie ili ekspansiis al la okcidenta Mediteraneo, establinte la provincojn Afriko *(Africa)* en nuna Tunizio, Hispanujo *(Hispania)* kaj *Gallia Narbonensis* (en suda Francujo) kun la grava urbo Masilio (la nuna *Marseille*).

### e) La fino de la milita erao kaj Cezaro

Evidentiĝis gloro kaj honoro de la romia ŝtato, ĝenerale nomata Romia Imperio (lat. *Imperium Romanum*). Ĝi establiĝis al la plej granda kaj plej longe daŭranta regno de antikva epoko, kiu postefikas eĉ ĝis la nuntempo. Dum la unua jarcento antaŭ Kristo la romia strebado evoluis tute negative. Multaj militoj elĉerpis la vivopotencon de la romianoj, precipe de la kamparanoj. Ili falis en mizeron, dum la kavalerianoj ("ĉevalhavuloj" = lat. *equites*) riĉigis sin per predfarado en la konkeritaj landoj. Sekvis el tio enorma sociala malakordo, kiu eksplodis en intercivitanan militon (49-45 a.K.). Kelkaj militestroj provis solvi la situacion, sed vane. Nur Cezaro (lat. *Gaius Iulius Caesar*) mastris la krizon. Li venkis kaj fariĝis diktatoro kaj nove ordigis la Romian Imperion. Sed kompleto finis lian karieron, kiam li estis murdita dum senata kunveno (15a de marto 44 a.K.).

Jam antaŭ tiu intercivitana milito Cezaro gloriĝis, kiam li estis konsulo (en 59 a.K.) kaj prokonsulo en *Gallia Narbonensis* dum kvin jaroj (58-53 a.K.) kaj celis konkeri la tutan liberan Gallion. Per rigora milito kontraŭ la gallaj triboj, kiuj en plej alta grado sin defendis, li subigis la tutan landon (58-52 a.K.), kiu fariĝis romia provinco.

Dum tiu militiro Cezaro ankaŭ transiris la Manikan kanalon. Kvankam li nur palpe provis esplori Britujon, per tio fakte komencis la invado de la romianoj en Britujon. Tio estis la unua paŝo. Liaj posteuloj, la imperiestroj ekde lia adoptofilo Aŭgusto (lat. *G. Iulius*



*Caesar Octavianus Augustus*) plenumis, kion li komencis: la kompletan konkeradon de Britujo.

## 2. La invadoprovo de Cezaro

### a) La unua ekspedicio

Kvankam la kontraŭgalla militiro vere ne estis facila tasko, tamen Cezaro venkis per sia aplombe energia decidemo, precipe dum bataloj. La jaro 55 a.K. postulis lian tutan decidovolon: ĝermanaj triboj, loĝantaj ĉe la malsupra Rejno, la Uzipetoj kaj la Tenkteroj, estis venkitaj. Post tio li returnis al Gallio ĉe la marbordo, la regiono ĉirkaŭ *Arras*, kie vivis la triboj de la Morinoj. De tie li intencis transiri al apenaŭ konata Britujo. Povas esti, ke Cezaro nur celis scivoleme esplori la insulon. Sed pli verŝajne li intencis punbati la insulajn tribojn, ĉar ili subtenis la gallojn.

Antaŭ ol Cezaro transŝipiĝis, li komisiis la oficiron Voluseno *(Volusenus)* skolte esplori la transan marbordon. Samtempe li ordonis ŝiparon al la haveno *Portus Itius*, proksime de nuna Kalezo (*Calais*). Tien venis delegitoj de la britaj triboj, kiuj, avertite, promesis submetiĝon kaj ostaĝojn. Sed suspekteme Cezaro sendis kun ili la fideman kaj honestan tribestron *Commius* al Britujo, por pacigi la tieajn tribojn.

Voluseno revenis post kvin tagoj, kaj Cezaro transveturis la markolon kun 80 ŝipoj, ŝarĝitaj per du legioj; tio okazis fine de aŭgusto. Forveturinte dum la nokto, li alproksimiĝis al la brita bordo matene je la 9a horo – eble tie, kie lokiĝas la hodiaŭa Dovero. Sed tien alveninte oni ne povis albordiĝi, ĉar sur la klifaj rokaĵoj bone armitaj militistoj atendis la romianojn. Tial Cezaro forvelis je sep mejloj (ĉ.11 km) kaj ankris antaŭ bone superrigardebla, ebena strando. Sed la Britoj estis sekvintaj kaj provis, pafante sagojn, malebligi la romianojn atingi la bordon. Kun siaj ĉevaloj la britoj atakeme rajdis en la malprofundan akvon.

Cezaro, ekkoninte tian kuraĝan batalpretecon, komandis la militŝipojn al la strando – flanke kaj nevidite de la malamikaj britoj. Katapultite kaj trafite de sagohajlo tiuj retiriĝis, kaj el la ŝipoj saltis plenarmitaj legianoj sub gvido de la signoportisto de la 10a legio, kaj alstormis kun impeto. Ekestis feroca batalo, ĉar la britoj ĉevalrajde atakis kaj la legianoj dise batalis, ĉiu laŭ sia bontrovo, superŝutate de sagaro.

Cezaro nun ĵetis en la batalon pluajn militistojn el la eskortŝipoj, ĝis tiam ankoraŭ ankriĝintaj. Fine li kunordigis la legianojn kaj per amasatako rebatis la britojn al fuĝo. La romianoj ne sekvis ilin. Parto de ilia kavalerio restis sur ŝipoj kiuj ne atingis la bordon.

Vidinte sian malsukceson, la britoj cedis kaj pretiĝis al paco. Ili sendis delegitojn al Cezaro, kiuj petis pri paco kaj pardono. *Commius*, antaŭsendita por skolti (sed kaptita de la Britoj), venis kun ili – nun ne plu enkatenigita. Cezaro ludis la rolon de ofendito, plendis pri la malamika agado kaj postulis ostaĝojn; kelkajn li tuj ricevis, aliaj estis promesitaj. Ekkonante la romian superecon, kelkaj tribestroj intertraktis pri paco.

Sed la paco ne daŭris. Plua kontingento de romiaj rajdistoj, urĝe bezonata por plifortigi la trupon, ne alvenis. Ŝtormoj blovantaj sur la maro malhelpis surbordiĝon de la romiaj ŝipoj, kaj ili devis reveturi al la galla bordo. Samtempe eksterordinare alta tajdo alstrandigis la ŝarĝoŝipojn, damaĝante ilin.

La britoj ekkonis la situacion kaj rompis la packontrakton. Kiam la 7a legio penetris enlandajn kampojn por serĉi furaĝon, ĝi estis surprize atakata de britaj militistoj kaj estus pereigata, se ne Cezaro, ekkoninte la danĝeregon, estus alrapidiĝinta. Nun la britoj ĉesis sian atakadon, kaj ĉiuj romianoj retiriĝis en sian bivakon. Ĉar la promesitaj ostaĝoj ne estis senditaj, Cezaro konjektis perfidon de la britoj. Daŭrigan militiron li ne povis riski. Tial li riparis la damaĝitajn ŝipojn kaj revelis al Gallio – post entute trisemajna restado en Britujo. Kvankam la ekspedicio certe ne estis sukceso sed nur vana konkerprovo kaj esplorado, tamen Cezaro gloriĝis. Laŭ romia vidpunkto la afero estis sensacia evento.

**b) La dua ekspedicio**

Post unu jaro Cezaro denove riskis invadi Britujon - fine de julio 54 a.K. Li forlasis *Portus Itius* kun multaj ŝipoj: 28 militŝipoj kaj 600 kargoŝipoj, kiuj portis kvin legiojn (ĉa. 15 000 militistoj) kaj 2000 rajdistojn. Sekvis 200 privataj ŝipoj de komercistoj, kiuj esperis sukcesan negocon. Kiam la britoj ekvidis tian trupamason ili retiriĝis timigitaj, kaj Cezaro povis neĝenate surbordigi la grandan armeon. Post instalo de fortika bivako je oportuna bordoloko, Cezaro serĉis la britojn ankoraŭ dum la nokto. Tiuj preparis sin al batalo ĉe rivero, kie amaso da britaj rajdistoj kaj ĉarmilitistoj provis haltigi la cezaran



truparon. Sed atakante, Cezaro repelis la Britojn, kiuj nun kaŝis sin en arbaro, kie ili estis konstruintaj fortikaĵojn el faligitaj arboj. Sed ankaŭ tio ne sukcesis haltigi la Romianojn kaj la britoj fuĝis.

Cezaro ne sekvis ilin, ĉar intertempe ŝtormo karambole damaĝis liajn ŝipojn je la strando. Li ordonis, ke la ŝipoj estu tirataj sur la bordon por riparo. Tio daŭris dek tagojn. Danke al la sagaco de Cezaro la dilemo estis baldaŭ solvita, kaj la plua militiro decide plenumiĝis. Ĉiam kaj ĉie Cezaro ne permesis, ke la Britoj povis ripozi. La brita militarto tute ne estis simpla. La rajdistaro batalis lerte, ne atakante laŭ linio; ĉiu rajdisto batalis unuope renkonte al kontraŭulo. Treege danĝeraj estis la militĉaroj. Tiuj manovris rapide kaj la ĉaristoj, saltante de la ĉaro, batalis ankaŭ unuope. Tiel disigite ili kapablis, senordigi kaj malfortigi la legian linion. Same kiel dum la unua ekspedicio la Britoj embuskis tri furaĝon serĉantajn legiojn per surprizatako, sed atenteme la legianoj kontraŭbatalis ĝis kiam la Britoj cedis al fuĝo persekutite kaj masakrite. De tiam ili ne plu riskis amasan batalon. Cezaro, kiu divenis ilian insidan militadon, nun marŝis rekte en la internon de la lando ĝis la rivero Tamizo en la regno de Kasivelaŭno (*Cassivellaunus*). La granda brita trupamaso je la kontraŭa riverbordo ne timigis la romian rajdistaron. Ĝi transiris la riveron malgraŭ ties alta fluo, sekvate de la legianoj, kaj kun impeto rebatis la britan armeon al amasa fuĝo. Kasivelaŭno, vidante sian malsukceson, kolektis la restintajn batalantojn kaj embuskis en densa arbaro, por – kiel kutime – superigi disigitajn armeopartojn de Cezaro. Tiu ordonis al la legianoj, ne disiri kaj nepre resti kune. Poste li bruligis la vastan kamparon por perforti la malamikon al kapitulaco. Eble Cezaro estus cedinta pro la konstanta obstineco kaŭzata de Kasivelaŭno. Sed konsekvenca kaj rigora agado estis parto de lia sukceso – kaj eble pli gravis la jam proverba militfeliĉo, kiu tiom ofte favoris Cezaron.

Meze en la malamika lando ŝanĝiĝis la senespero al esperplena afero. Ĉar aperis Mandubrio (*Mandubrius)*, iama tribestro de la Trinovantoj, kiuj loĝis en la transtamiza regiono. Antaŭ jaroj, persekutite de Kasivelaŭno, li estis fuĝinta al Gallio kaj tiam petis protekton de Cezaro. Nun, reveninte en sian patrujon, li akompanis sendintojn de la trinovanta popolo, por interpaciĝi kun Cezaro kaj submetiĝi al li. La senditoj petis Cezaron, ke li instalu Mandubrion kiel reĝon de la Trinovantoj. Cezaro konsentis, sed postulis ostaĝojn kaj furaĝon. Nun ankaŭ aliaj britaj popoloj – la Cenimagnoj, Segontiakoj, Ankalitoj, Bibrokoj kaj Kasoj – submetis sin al Cezaro. Tamen ne estis pacigita aŭ eĉ submetita la tuta apudtamiza lando, ĉar

Kasivelaŭno ankoraŭ permilite rezistis. En densega arbaro, en loko, fortikigita per alta remparo kaj protektata de marĉo kaj provizita de granda amaso da furaĝo, Kasivelaŭno retire kunvenigis la kamparanojn kun iliaj bestoj, atendante la romianojn. Cezaro ne hezitis kaj marŝis tien. Kvankam li vidis, ke la fortikiĝita loko estas tre bone defendebla, li ŝtormis kontraŭ du flankojn de la fortikejo.

Kasivelaŭno vane rezistegis. Fine la britoj fuĝis kaj postlasis grandan amason da bruto. Multaj fuĝintoj estis kaptataj aŭ mortigataj. Kasivelaŭno provis lastan atakon kontraŭ la romia ŝiparejo. Li ordonis la trupojn de la ĉemaraj popoloj, surprize preni la tutan ŝipfortikejon. Sed lia plano malsukcesis. Kiam la britoj preparis la atakon, la romianoj kontraŭpuŝis kaj venkbatis la plej multajn el ili.

Nun Kasivelaŭno ekkonis kaj akceptis sian malsukceson, kaj pro la postbatale dezertigitaj kampoj, estis preta kapitulaci. Liaj aliancanoj jam estis forlasintaj lin kaj estis nun ligitaj kun la romianoj. Kiam *Commius* (jam konata de la pasintjara ekspedicio) ofertis intertraktojn pri paco, li sendis delegitaron al Cezaro por prezenti sian submetiĝon. Cezaro akceptis kaj postulis ostaĝojn kiel garantion. Krome li persistis pri tributo, pagenda ĉiujare al la romia respubliko.

Cezaro nun urĝis pri baldaŭa forlaso de la insulo, ĉar la aŭtunaj ŝtormoj eble malhelpus reveturadon. Tuj post kiam la ostaĝoj estis transdonitaj, li enŝipiĝis kun la tuta armeo. Sur senmova marsurfaco la romia ŝiparo nedamaĝite atingis la kontinenton. Entute du monatojn Cezaro estis restinta en Britujo, kiun li deklaris kiel novgajnitan romian provincon. Sed li eraris. Kiam ne plu troviĝis romiaj soldatoj sur la fora insulo, Kasivelaŭno regis kiel antaŭe – libere kaj sendepende de Romio. Do ankaŭ la dua konkerprovo de Cezaro finiĝis senrezulte.

## 3. La romia konkerado kaj la rezistemaj britoj

La romia avido por tute konkeri la sovaĝan insulon Britujo iom ĉesis, kaŭzata de la morto de Cezaro kaj posta konflikto pri la unuaranga potenco en Romio. La britaj triboj tial povis senzorge daŭrigi sian interkverelemon ĝis kiam la romia imperiestra regno stabiliĝis kaj plifortiĝis. Siajn pacokverelojn la britoj ja povis eluzi preskaŭ unu jarcenton, ĝis kiam la romianoj ekpensis rondigi sian regnon, precipe por deturni malamikajn popolojn de la endanĝeritaj limregionoj.



Eble de tiu stato devigite (ĉiam la romiaj kronikistoj raportas pri "regna neceseco") imperiestro Klaŭdio (*Claŭdius)* ordonis militiron kontraŭ la Britoj (43 p.K.). Li komisiis Plaŭtion (*Aulus Plautius),* tiaman legaton en la provinco Panonio (*Pannonia)*, do eminentulon, denove invadi kun granda armeo (pli granda ol la ekspedicio de Cezaro) kun la celo de kompleta konkero. Sed la trupoj obstinis, eble malinkline al la insulbarbaroj, konataj kiel sentimaj militemuloj. Postulinte asiston el Romio, Plaŭtio estis helpata de *Narcissus*, kiu jam distingis sin sub lia imperiestro. *Narcissus* alparolis la legianojn, batali pro la romia gloro. Kaj li sukcesis, ke ili sekvis sian armeestron al Britujo.

Nun Plaŭtio riskis la transŝipadon, dispartigante la truparon en tri korpusoj. Vidante tian trupamason, la britoj retiriĝis sugeste ke la romianoj baldaŭ laciĝus kaj reveturus sensukcese – ĵus kiel Cezaro antaŭe. Sed Plaŭtio, ne trompebla, sekvis la britojn en la internon de la insulo. Per bato post bato li gajnis superecon. Unue li venkis la tribestron Karatako (*Caratacus)*, poste ties fraton Togodumno (*Togodumnus)*, ambaŭ filoj de Kunobelino (*Cunobellinus)*, morta tribestro (aŭ reĝo) de la Siluroj. Eluzante la intertribajn kverelojn, li gajnis resp. "liberigis" la tribon de la Bodunnoj, regataj de la Katuvelaŭnoj; granda parto el ili aliancis kun li, eble por kunmiliti kontraŭ la opresantoj. Plaŭtio nun ne plu opiniis ke estas danĝere marŝi en la internon de la insulo ĝis forte fluanta rivero sen iu ajn ponto. La britoj trans la rivero supozis, ke la romianoj ĉesus militi kontraŭ ili. Sed tiuj trapasis la akvon malgraŭ ties torenta fluo; la lerta galla kavalerio transiris kaj daŭrigis la venkan militiradon kontraŭ la britoj je la alia bordo de la rivero. La posta imperiestro Vespaziano (*Flavius Vespasianus)* kaj la legato (kaj frato de Plaŭtio) Sabino (*Sabinus*), kiujn Plaŭtio postsendis, subtenis la rajdistaron konkeri la terenon komplete, venke sekvante la britojn. Tiel oni atingis la riveron Tamizo, kie finiĝis la venkmarŝado: ĉar veninte en marĉon, la legioj preskaŭ pereis. Nur kun granda peno Plaŭtio savis ilin el la brita embusko.

Provizore li nun finis la progresadon. Li ne volis endanĝerigi sian trostreĉitan truparon. Pluan malvenkon li konsideris katastrofa fino de la entrepreno, komence glorkrona. Tial li petis helpon, sendante mesaĝon al la imperiestra kortego en Romo. Sekve de tiu inkuba sciigo la imperiestro Klaŭdio sendis sian samnoman filon por asisti Plaŭtion. Tuj tiu Klaŭdio-filo ekmarŝis parte ŝipe parte piede, kaj post

la alveno en Britujo li ekprenis la ĉefkomandon, verŝajne laŭdekrete de sia patro.

Nun la romia venkomarŝado daŭris. Klaŭdio unue subigis ĉiujn rezistemajn tribojn, precipe la Trinovantojn, kaj poste ties ĉefurbon Kamuloduno (*Camulodunum*, hodiaŭ *Colchester*). Aliaj triboj, malice ĝojaj pri la subpremitaj Trinovantoj, transiris libervole sub la klaŭdia komando. Saman sukceson ankaŭ Plaŭtio akiris kiam li gajnis la submetiĝon de diversaj aliaj triboj. Rekompence li lasis la tribestrojn en regna pozicio super la subuloj. Pro tio li estis omaĝinta al la romiaj senato kaj imperiestro. Per tia saĝa agado Plaŭtio certigis la daŭran romian konkeradon kaj regis kiel prokuratoro en Britujo – pli precize: en ties sudorienta parto. Klaŭdio revenis al Romo, kie li triumfis kaj ricevis de la senato la alnomon *Britannicus*.

Interrompiĝis la romia kulturado, kiam en la jaro 47 p.K. Plaŭtio en sia ofico estis sekvata de Ostorio (*Publius Ostorius Scapula)*. Ja la britoj pensis oportune demonstri, kiu estis mastro en sia domo. Sed ili eraris pri la sintenado de la romianoj. Ostorio, la nova prokuratoro, sufokis indigne kaj senindulge la komploton des pli multe, ĉar tio instigis la romiofidelajn britojn ribeli kontraŭ ili. Li brule detruis ilian terenon post kruela puno de la ribelintoj. Li responsigis precipe la Icenojn, loĝantajn norde de la Trinovantoj ĉe la orienta bordo kiuj pruviĝis ekstreme potencaj super siaj najbaroj kaj estis tre militemaj. Ilian rempare protektitan fortikaĵon li sturme prenis helpe de sia filo Marko Ostorio (*Marcus Ostorius)*, kiu distingiĝis per sentima braveco. Nun li turnis sin okcidenten kaj batvenkis ĉiujn rezistemajn tribojn, ĝis kiam li atingis la bordon de la hibernia maro.

Novan ribeladon iniciatis la Brigantoj, loĝantaj en la meza parto de la insulo. Per rapida militiro Ostorio batvenkis tiujn malbonfarintojn. Poste ankaŭ la Siluroj en la sudo de Kimrio provis obstine kaj rezisteme forskui la romian regnon. Ne sufiĉis, ke Ostorio kontraŭmilitis ilin, sed por daŭra regado li nun bezonis fortikaĵojn laŭ romia modelo. Li ree fondis la urbon Kamuloduno (*Camulodunum)*. Ties garnizonon li plenigis per militspertaj legianoj kaj militkaptitoj. Tiu muroforta urbo devis protekti la landon kontraŭ ĉiuj ribelantoj kaj samtempe konatigi la romian civilizacion al la aliancanoj.

Inter ĉiuj triboreĝoj elstaris Karatako (*Caratacus)* de la Katuvelaŭnoj. Tiu, fuĝante de sia propra tribo al la Siluroj, ege malhelpis la prokuratoron Ostorio punbati ilin. Alian tribon, la Ordovicojn, li ankaŭ perfortis kunbatali. Sur alta roka monto ekflamis la batalo kontraŭ la romianoj. Dekomence avantaĝite pri sia preciza kono de la tereno, Karatako bridis la armilpotencon de la legianoj. Sed kiam tiuj atakis, uzante siajn lancojn kaj glavojn kaj superŝutante ilin per hajlo de sagoj, la unuiĝintaj britoj devis retiriĝi sur la altejon. Fine ili kapitulacis, kondukite de la filoj de Karatako. Lia edzino kaj ankaŭ lia filino estis kaptitaj de Ostorio, dum Karatako mem sukcesis eskapi. Li turnis sin al la Brigantoj, por ke reĝino Kartimandua (*Cartimandua)* protektu lin kontraŭ la romianoj. Tion ŝi rifuzis kaj perfide enmanigis lin, enkatenigita, al liaj severaj malamikoj. Transportita al Romo antaŭ imperiestro Klaŭdio, Karatako pravigis sin defendinto de sia patrujo per fiera kaj brava parolado. Impresite de tia aplomba kaj digna sinregado, Klaŭdio pardonis.

Intertempe Britujo daŭre malkvietiĝis. Ĉiun romian dismarŝadon oni eluzis. Jam kelkaj kohortoj, logitaj en embuskon, apenaŭ povis defendi sin kontraŭ kaptiteco, ĝis kiam Ostorio sendis freŝajn trupojn kaj liberigis ilin. Ripeta ribelo de la Siluroj ektimis Ostorion. Sekve de lia minaco ekstermi la tutan tribon, la Siluroj defendis sin obstine kaj per tuta sia energio. Ili eĉ kaptis du romiajn kohortojn kaj krome sin aliancis kun kelkaj triboj, kiuj antaŭe estis aliancanoj de la romianoj. La situacio malpliboniĝis, ĉar ĵus tiam Ostorio mortis (52 p.K.).

Lia posteulo, Aŭlo Didio (*Aulus Didius)*, rapide almarŝis kaj trovis tre danĝeran militan situacion. Ĵus antaŭ ol li alvenis, tuta legio, kondukita de Maŭlo Valento (*Maulus Valens)*, estis venkita. Didio savis ilin per forta impeto. En amasa fuĝo la Siluroj forlasis la batalkampon. Ekkonante kaj agnoskante la romian superecon, multaj triboj denove aliancis kun la konkerantoj. Tion faris ekzemple Venutio (*Venutius*), estro de la Brigantoj kaj edzo de reĝino Kartimandua. Tiu virino, malica kaj insidema, aranĝis ke li konfliktis kun la triba popolo, kaj fine ŝi arestis lin. Profite de tia kverelo, Didio sendis kontraŭ la Brigantoj du kohortojn, kiuj facilbatale subigis ilin. Samtempe la legio de Cezio Naziko (*Caesius Nasica)* akiris pluan venkon, kiu konsidere malŝarĝis Didion, la tre maljunan prokuratoron. Dum sia regnotempo (52-58 p.K.) Didio estis ege meritplena pro la establo de multaj fortikaĵetoj en la norda limregiono.

Ĉiujn sukcesojn de Didio lia posteulo Veranio (*Veranius*) tamen perdis pro sia leĝereco. La Silurojn li apenaŭ ĝenis. Ties loĝlandon li

nur parte, sed ne tute, ruinigis. Tial ili daŭrigis sian nerompeblan kontraŭromian malemon. Sed ili ne sukcesis forpeli la romianojn; Veranio, la ambiciema fanfaronulo, baldaŭ mortis, kaj Paŭlino Svetonio (*Paulinus Suetonius*), tuj poste instalita kiel prokuratoro, provis bridi la britan maldisciplinon, rigore kaj senindulge.

Svetonio atakis la insulon *Mona* (nuna *Angelsay*), plena de granda amaso da fuĝintoj: per plataj boatoj li surbordigis la trupojn al malprofunda akvo. Ili venkis armilhavajn militistojn, sed ankaŭ multaj virinoj, vagante tien kaj tien ĉi, kun torĉoj, funebraj vestoj kaj malplektita hararo atendis sian inkuban sorton. Druidoj, suprenlevantaj la brakojn, preĝis al siaj dioj kaj malbenis la romiajn opresantojn. Sed vane ili agis. La legianoj, komence emocie timigitaj, glavbatis la mizerulojn senkompate kaj bruligis ilin per ties propraj torĉoj kaj faligis boskojn konsekritajn per la sango de militkaptitoj. Fine Svetonio postlasis tie okupan armeon.

Post tio okazis ribelo ĉe la Icenoj, kaŭzata de la kanajleco de la romia soldataro. Tiu traktis la reĝon Prazutago (*Prasutagus*) kiel banditon kun tuta lia familio, kvankam li heredigis la imperiestron. Malgraŭ tiu nobla gesto, la romianoj rabis lian tutan propraĵon kaj torturis lian edzinon *Boudicca*. Sekve de tiu fiago venĝe estiĝis granda ribelo, iniciatita de la reĝino (61 p.K.). Subtenate de la Trinovantoj, la Icenoj komencis militiron. Unue tiu direktiĝis kontraŭ la bastioneca romia urbo Kamuloduno. Kun la preteksto, ke la romiaj veteranoj malbontraktis la britan loĝantaron, oni konkeris la urbon post dutaga sieĝo.

Plifaciligis la sturmadon, kiam en la templo, konsekrita al la diino Viktoria (*Victoria*) ties statuo terenfalis turnante sin kun la vizaĝflanko sur la fundon; en tio anoncis sin inkubo, vidata de la superstiĉaj soldatoj. Saman sorton spertis la 9a legio sub komando de Peticio Cerealo (*Petitius Cerealis*), alproksimiĝanta por liberigi la urbon. La furiozaj britoj batis ĝin al fuĝo.

Ankaŭ Svetonio komence ne povis restarigi pli stabilan situacion. Tramarŝante la malamikan regionon, li volis savi la komerclokon Londinio (*Londinium*) ĉe la rivero Tamizo, sed li trovis ĝin nedefendebla. Sekve la Icenoj detruis la urbon kaj masakris la loĝantaron, eble ĉ.70 000 personojn. La urbo Verulamio (*Verulamium*), fondita de la romianoj, estis plua viktimo de la Britoj. Senkompate ĉiu, kiu aspektis romie, estis trafita de mortarmilo.



Por savi la romian gloron, Svetonio ne povis ne reestabli la romian regnon pere de milita sukceso. Tio fakte devis okazi; lia tuta truparo nombris 10 000 legianojn. Singarde li serĉis taŭgan batallokon kaj trovis ebenaĵon kovritan per densa arbaro kaj mallarĝa alirvojo. Li starigis multoblan linion kaj plifortigis ĝin je la aloj per amasigita rajdistaro. Tiuspecan amasatakon la britoj ne konis; ili kutime militis unuope, batalanto kontraŭ batalanto.

La unuiĝintaj britoj do marŝis al la batalejo. La virinoj, sidantaj sur veturiloj, laŭtvoĉe stimulis la militistojn al venkbatala preteco. Tion faris ankaŭ reĝino *Boudicca* kun siaj filinoj, sangavide postulante venĝon. Ankaŭ Svetonio ne bridis sin, kaj same fanatike stimulis sian truparon al venĝo kaj venko. La batalo komenciĝis en la mallarĝejo, kiun la legianoj brave defendis. Poste ili impetis kejlforme kaj venke frakasis la britojn. Senkompate ankaŭ la virinoj estis masakrataj - reĝino *Boudicca* sin venenis. Entute la britoj perdis 80 000 batalantojn, la romianoj nur 400.

Kiel ofte dum sia historio, post la venko la romianoj malharmoniis: Suetonio estis forte enviata de sia altranga kolegaro. Julio Klasiciano (*Iulius Classicianus*), delegita el Romo por sekvi la fuĝintan Katon (*Catus*) – tiu forlasis la insulon, kiam Kamuloduno brulneniiĝis – forte intrigis kontraŭ Svetonio, kvazaŭ estis li kiu kulpis pri ĉiuj iamaj malsukcesoj. Svetonio povis refuti tiajn riproĉojn kaj daŭrigi sian oficon. Sed ne longe: finfine li devis transdoni sian tutan armeon al Petronio Turpiliano (*Petronius Turpilianus*), ĝis tiam konsulo. Sed li montriĝis maltaŭga kaj neagema, kaj denove la britoj senĝene ekribelis.

La brita afero ŝanĝiĝis, kiam Tito Flavio Vespaziano (*Titus Flavius Vespasianus*) fariĝis imperiestro (69 p.K.). Bone informita pri la brita stato pro lia antaŭa restado en Britujo dum la militiroj de Aŭlo-Plaŭto, li inklinis al la romia truparo sur la insulo, por ke tiu venku. Sed la sekva militmovo ne funkciis glate. Lia imperiestra antaŭulo kaj nuna kontraŭulo Aŭlo Vitelio (*Aulus Vitellius*) sukcesis, ke granda parto de la oficiroj deĵorantaj en Britujo apogis la partion de Vespaziano kun la sekvo, ke la armea estraro interkverelis – lasante la britajn tribojn al si mem.

Venucio (*Venutius*), tribestro kaj reĝo de la Brigantoj, utiligis tian dileman malkonkordon kaj stimulis la britojn al rezistado. Lia edzino, reĝino *Catimandua*, ludis sinistran rolon, ĉar ŝi malfideliĝis al li kaj

edziniĝis kun lia ŝildoportisto Velokato (*Vellocatus*). La tribo kondamnis tian fiagon kaj nun subtenis Venucion. Tiu devis militi ne nur kontraŭ la romianoj sed ankaŭ kontraŭ Kartimanduon. Komence li venke batalis kontraŭ ŝi. Sed la reĝino trovis rifuĝon ĉe la romianoj, kiuj nun vole aŭ nevole devis militiri. Sen sukceso – kaj Venucio senĝene daŭrigis regi sian popolon, la Brigantojn.

## 4. La definitiva konkerado pere de *Gaius Iulius Agricola*

La ĥaosa stato en Britujo spegulas saman staton en la ĉefurbo Romo post la memmortigo de la imperiestro Nero, al kiu sekvis kvin regnestroj: *Galba, Otho, Vitellius, Iulius Sabinus* kaj *Vespasianus* (68-69 p.K.) el kiuj fine definitiviĝis Vespaziano (reg. 69-79 p.K.). Li sciis pri la armea fuŝmastrumado en Britujo, ekestinta post la eksigo de Svetonio. Certe la britoj vivis barbare kaj malinkline al la romia civilizado, superstiĉe kredantaj je sovaĝaj bestoj, ekz. leporoj. La romianoj abomenis ilin pro tio, krome alrigardis ilin eksterleĝaj barbaroj, kiuj rabis kaj marodis ĵus kiel plaĉis al ili. Ne estas mirige, ke la britoj ribelis.

Vespaziano serĉis honestan, lertan viron, kiu kapablus reestabli romiajn disciplinon kaj ordon. Por tia severa ofico li trovis la altrangan oficiston Agrikolo (*Gn. Iulius Agricola*). Tiu, deveninta el nobela familio (nask. 40 p.K.) karieris ĝis kiam li fariĝis milita legato de la 20a legio, nomita *Valeria Victrix* (71-73 p.K.), kaj prokuratoro en la nova provinco Britujo en la jaro 77. La prokuratorecon en Britujo estis distinginta al li imperiestro Vespaziano sekve de liaj meritoj dum antaŭa milita deĵoro sur la insulo. Li elstaris parte pri siaj militistaj kapableco kaj lerteco, parte (pli grave) pri siaj romiaj virtoj, precipe pri sia justemo. Inter la aliaj kvalitoj gravis senkorupteco. Ĉar korupteco karakterizis tiutempe preskaŭ ĉiun oficiron kaj oficiston deĵorantan en Britujo, kaj li firme planis elradikigi tiun malvirton.

Tiun humanecan karakteron ankaŭ la britoj sentis, ĉar tiu honesta viro plena de homa digno (antaŭ la soldata kariero li studis filozofion) strebis substitui la kelto-britan barbarecon kaj sovaĝecon per la romia-helena klasikismo, do eduke kultivi la insulbarbarojn al romianoj. Ĉu li sukcesos?



Sed unue, post lia alveno sur la insulo, aliaj devoj postulis lian tutan energion. Ĵus Cerialo estis akirinta kompletan venkon super la militemaj kaj potencplenaj Siluroj. Aliflanke, pro la ekestinta senzorgemo de la legianoj, la Ordovikoj neniigis tutan rajdistan taĉmenton.

Ĉar la vasta regiono evidente ekvigliĝis kaj provis forpeli la Romianojn, Agrikolo rapiddecide ekmarŝis por subigi la malamikojn. Ĉiujn dise bivakantajn trupojn li kolektis por la batalo. Li mem staris en la unua batallinio kontraŭ la Ordovikoj kaj tio instigis ĉiujn legianojn al kuraĝa disbato de la britaj militistoj kaj fina venko.

Agrikolo ne kontentiĝis sciante la britan batalemon, kaj daŭrigis la militon. Li venke okupis la insulon *Mona*. Meze de siaj kunbatalantoj li piede transiris la maron laŭ malprofundaĵoj. La insulloĝantoj ektimegis kaj petis pri paco. Montriĝis nun la virtoj de Agrikolo: li ekzercis indulgon al la indiĝenoj, la impostoj restis tolereblaj, la tributo estis ne tro alta kaj laŭleĝa.

Unuflanke la Britoj ne ĉesis, inciti la romiajn okupantojn kaj la nova prokuratoro devis postuli nepran disciplinon, aliflanke li penis pacigi ilin per siaj famiĝintaj virtoj. Kompreneble ne estis tolerebla por li la kverela sendependemo, tipa por multaj triboj. Tial daŭre, insiste kaj ekzemplodone li edukis ilin ĝis kiam ili konsentis al la romia kulturo. Li konstruigis romiajn ŝtonajn templojn, finance subtenataj de li, kaj ĉie estiĝis fortikaĵoj por certigi lian kulturan programon.

Tiun programon li daŭrigis dum la tria milita jaro, kiam li aliris golfen, nomatan *Tanaus*. Kiel novaĵo la ĵus ekestintaj fortikaĵoj estis ekipitaj per sufiĉe da nutra provizo. Tiel rezistemuloj ne povis profiti vintron por rekonkeri perditajn regionojn, do ili senkuraĝiĝis.

Serene observante siajn devojn, Agrikolo celis deteni ĉiujn tribojn, kiuj vivis ekster la romiigita teritorio. Ĉar eble tiuj agresis kaj alianciĝis kun la pacigitaj popoloj, do kaŭzis novan ribelon. Tiu danĝera situacio estis evitita, kiam la agresantoj estis forpuŝitaj kaj ilia lando okupata.

Tial Agrikolo daŭrigis sian militan agadon dum la venontaj jaroj kaj plivastigis la romian teritorion norden. Unue la golfoj *Clota* kaj *Bodotria* (la nunaj *Firth of Clyde* kaj *Firth of Forth*) estis liaj okupceloj, nun fortikigitaj. Trans ili etendiĝis Kaledonio. La malamikaj triboj fuĝis sur proksiman insulon.

La sekvantan jaron de la militirado, la 5-an, Agrikolo atingis la kontraŭ-hibernian bordon. Eble li konsideris transŝipi al Hibernio, ĉar li renkontis ekzilitan hibernan princon, al kiu li promesis, lin reinstali en lia perdita regiono.

En la 6-a militjaro Agrikolo transpaŝis la golfon de Bodotrio kaj ordonis la ŝiparon ĉirkaŭveli Kaledonion. Tion eksciante, la kaledoniaj triboj malpacienciĝis resp. malpaciĝis kaj planis kontraŭmiliti la Romianojn kaj detrui ilian fortikaĵon ĉe la golfo. Tiu intenco ne restis kaŝita al Agrikolo; per kontraŭmovoj li malebligis iliajn venkmanovrojn. Ekkonante tion, la Kaledonianoj riskis batalon. Dumnokte ili atakis la 9-an legion. Tiun savis Agrikolo, hazarde (aŭ ne) eksciinte pri la insidaĵo. Li dorsflanke impetis kontraŭ la malamikoj (nun batitaj de ambaŭ flankoj). Ties kompletan malvenkon tamen malhelpis marĉoj kaj arbaroj, ĉirkaŭantaj la batalejon.

Kvankam tiu ĉi militiro nur estis malgranda triumfo, tamen rezultis el ĝi reakiritaj disciplino kaj batalemo – ambaŭ konformaj al la romiaj virtoj. Tiel entuziasmigite, la legianoj sekvis sian militestron, kiam tiu riskis, en la 7-a milita jaro (84 p.K.), sian plej ampleksan militiron kontraŭ la Kaledonianoj meze de ties malmilda, montokruda lando. Aŭ tio estu fariĝinta la plej eminenta triumfo aŭ la pereo de lia entrepreno? Ni vidos!

Intertempe el trans la maro veninta kohorto de ĝermana tribo de la Usipoj (lat. *Usipeti*) surprize kaptis tri ŝipojn de la Romianoj, velis norden laŭ la kaledonia bordo kaj ekbatalis kontraŭ la kaledoniaj enloĝantoj. Sed ili estis kaptitaj kaj ekzekutitaj kiel piratoj. El tio la militemaj kaledoniaj triboj spertis sian hereditan batalan bravecon kaj ne ĝenis, tion pruvi ankaŭ kontraŭ la Romianoj, precipe kontraŭ Agrikolo. Tiun ili estimis sole pro lia militarto, sed aŭdace ili sentis superi lin per sia propra bravegeco. Tiamaniere ilia sorto decidiĝis ĉe monto Graŭpio (*Graupius*, verŝajne *Ben Macdhuil* en la *Graupian Mountains*) en la plej norda parto de Kaledonio.

Tiun militiron Agrikolo komencis per du aranĝoj. Unue, li ordonis la ŝiparon al la norda kaledonia bordo, tie rabante kaj senordigante, por eksciti timegon ĉe la agresemuloj en Kaledonio. Due, li marŝis tien renkonte al monto grandioze aspektanta pro ĝia alteco. Same grandioze tamen ĝi ankaŭ aspektis pro sia multarmila koloseco. Vere kolose laŭ nombro ĝin okupis la kaledoniaj Britoj: 30 000 batalpretaj viroj tie staris, kiam la legioj alvenis. Ankaŭ la legianoj estis pretaj al batalo. Ambaŭ estis venkocertaj: la unuaj por aŭdace forpeli la impertinentajn invadantojn, la aliaj por glore venki pro sia romia potenco. Pri tiu situacio raportas la kronikisto Tacito (*P. Cornelius Tacitus*, bofilo de Agrikolo) en sia biografia libro *"De vita Iulii Agricolae liber"*. Unue la kaledonia tribestro Kalgako (*Calgacus*), per fajroferoca parolado stimulis siajn samlandanojn al fanatika rezisto. Per tio li klare montris al ili, ke okaze de romia venko ilin atendus aŭ sklaveco aŭ kruela venĝo. Same Agrikolo paroladis al sia glora armeo, instigante kaj entuziasmigante siajn bravulojn laŭ ilia heroeco, ke ili ne timu morton pro la gloro de la romia patrujo.

Emfaze jubilante la legianoj preferis tujan impeton. Agrikolo estis forminta la batalaranĝon jene: La surpiedaj helpotrupoj staris en la mezo, 8000 soldatoj. Je ambaŭ flankoj troviĝis la rajdistaro, entute 30 000 rajdistoj. Antaŭ la remparo staris la legianoj, kviete, atendante pli malfruan atakon kiel helpotrupoj, se tuja venko maleblus. Kvazaŭ terurigilo la brita armeo parte staris sur la ebenaĵo, parte marŝis supre sur la monton kiel dua linio, en densa aro. La mezon plenigis la batalĉaroj, veturantaj kun laŭta bruo tien kaj reen.Tiel la amaso de la Britoj pli kaj pli kreskis. Tion ekvidinte, Agrikolo kalkulis kun ĉiuflanka atako kaj distiris la liniojn; li mem descendis de sia ĉevalo kaj starigis sin kuraĝe antaŭ la standardoj.

La batalo komenciĝis distance. La Britoj lerte ĵetegis pafaĵojn kontraŭ la flankoj de la starigitaj legioj, kiuj hajle kraketadis kontraŭ la pezaj ŝildoj. Sed multekzercite la legianoj eltenis tiun ĉi impetan sturmon. Kvazaŭ brileganta feromuro la ŝildoj resaltigis la lancojn kaj sagojn. Nun sekvis tuja kontraŭsturmado de la Romianoj. Agrikolo ordonis glavan atakon de kvar batavaj kaj du tungraj kohortoj, do ĝermanaj helpotrupoj. Tion vidinte, la aliaj kohortoj de la mezo same antaŭen puŝiĝis kun elingitaj glavoj. Tian perlinian atakon la Britoj ne povis haltigi. Senprotekte kontraŭ la tranĉbatantaj masakriloj ili turnis sin al fuĝo. Same la britaj armilĉaroj returnis sin, persekutataj de la romia rajdistaro, ĝis kiam ili devis halti, premite de siaj propraj densaj linioj. Iliaj ĉevaloj, stamfante kaj kalcitrante, fakte plifortigis la romian atakon.

Tamen la Britoj jam ne dubis pri sia venko kaj ili pretigis sin al dorsflanka atako. Agrikolo, ekkoninte tiun malesperigan venkoprovon, tuj ordonis kvar rajdistajn eskadronojn al vasta atako, kiu finiĝis per terura masakro inter la fuĝantaj Britoj. Senlime furioze la Britoj

provis sin venĝi, kaŝite en densegaj arbaroj proksime de la batalejo. Agrikolo, eksciante pri tio (aŭ eble sugestante, ĉar li jam antaŭe spertis la britajn batalkutimojn) persekutis ilin per la rajdistoj, kiuj deĉevaliĝis kaj gvate serĉis ilin. Per siaj glavoj ili mortbatis la fortimigitajn Britojn, apenaŭ iu povis eskapi. Nur la nokto finis la kruelan buĉadon: 10 000 britoj mortfalis, 360 Romianoj fordonis sian vivon, inter ili la kohorta prefekto Aŭlo Atiko, kiu tro aŭdace enpenetris la malamikajn liniojn.

Nun la kaledoniaj Britoj perdis unufoje por ĉiam la emon por venĝo. Dum la romia armeo la venkon – malgraŭ la nokto – festis, ili kolere plendis pri sia malfeliĉo, eĉ bruligis la proprajn domojn kaj mortbatis siajn edzinojn kaj infanojn. Je tagiĝo ne plu montriĝis iu ajn kontraŭstarado, kaj nek unu malamikon nek militistan kuniĝadon la romiaj gvatantoj povis vidi. Tiel triumfe finiĝis la lasta militiro de Agrikolo en Britujo. Ne nur paco alvenis en Britujo, detruita kaj bruligita de severa milito, sed ankaŭ la romia invado fariĝis definitiva, digne al la energio de la multvirta *Gn.J.Agricola*, digne al la bravaj liberamaj Britoj. Post tio Agrikolo returnen marŝis tra la regiono de la Borestoj, kie oni enmanigis al li ostaĝojn; fine li eniris kun sia armeo la vintrokvartirojn. La ŝiparon, ankrinta al la kaledonia bordo, li ordonis ĉirkaŭveli Kaledonion. Ĝi enhaveniĝis en Trukulo (*Trucculum*).

Kvankam imperiestro Cezaro Domiciano (*Caesar Domitianus*, regn. 81-96) lin enviis (laŭ pretendo de Tacito), ĉar ĉiu gloro konformiĝus sole al li mem, li instigis la senaton, atribui triumfon al la grandglora konkeranto de Britujo. Tiu triumfo (de 84) finis la karieron de Agrikolo en Britujo; tien li ne plu revenis. En aliaj provincoj li distingiĝis pri sia militarto, venkante ribelantojn. Post tiuj aktivadoj li vivis en la ĉefurbo Romo, modeste, tamen altestimate, ĝis la morto je la 23-a de aŭgusto en la jaro 93 p.K.

## 5. La fortikigita romia potenco

Alie ol en Gallio, kie la kelta karaktero de la indiĝena loĝantaro estis tute integrigita kun la romia kulturo, ĉi tie sur la insulo la romiigo evoluis laŭ propra maniero. Certe la triumfa venkiro de Agrikolo fundamentis daŭran romiigadon de la Britoj. Sed tiuj nur parte adaptiĝis al la invada kulturo. Tiu evoluis precipe en nove fonditaj urboj kiel Eburako (*Eburacum*, nun *York*), Kamuloduno (*Camulodunum*, nun *Chichester*) aŭ Londono (*Londinium*), kiu ekestis grava transŝarĝa kaj komerca loko. Ekster tiuj ŝtonarmitaj urboj la kamparana vivo plue konformis al sia heredita kulturo; senĝene la homoj tie adoris siajn britajn diaĵojn. Tion permesis la romiaj okupantoj. Sed ili ne permesis la intertriban militiradon, la kvazaŭan pasion de la britaj popoloj. La homoj nun vivis pace kaj trankvile, laborante, agrikulturante kaj – komercante. La agrikulturajn produktojn la romianoj ŝatis, same la stanon el la minejoj de Kornvalo aŭ ŝtonkarbon el la meza parto de la insulo. Kiu preferis militi, tiu povis fariĝi legiano, eĉ oficiro. Do, ĉiuj avantaĝoj de la romia regno estis disponeblaj por ili.



Dum tuta generacio la plenpaca stato daŭris. Nur dum la regno de imperiestro Hadriano (*Hadrianus*, reg. 117-138) ĝi interrompiĝis kiam la Brigantoj, vivantaj ĉe la norda landlimo, minacis la provincon. Tial la imperiestro ordonis sekurigi la nordan limon de la brita regiono kontraŭ la Kaledonianoj per fortika remparo, etendiĝanta je 120 km de la Itum Estuario (*Ituma Æstuarium*, nun *Solwafirth*) en okcidento al la orienta bordo proksime al hodiaŭa havenurbo *South Shields*, nomata laŭ la imperiestro *Vallum Hadriani*, t.e. remparo de Hadriano. La fortikaĵa linio, konstruita 122 ĝis 127, unue konsistis el altaj teraj remparoj ĉe ambaŭ flankoj de la limo, gardataj de 17 fuortoj laŭ la limlinio, sed poste ŝtona muro plifortigis la tutan fortikaĵan linion.

Al posta imperiestro Antonino Pio (*Antoninus Pius*, reg. 138-161) tiu sekurigo ne sufiĉis. Norde de tiu li tial interligis la golfon de Kloto en la okcidento kaj la golfon de Bodotrio en la oriento (*Firth of Clyde* kaj *Firth of Forth)* per sama fortika remparo, poste nomata laŭ la iniciatinto *Vallum Antonium*, konstruita ĉ. 142. Tamen nur mallonge ambaŭ limesoj, tiel la latina nomo, povis deteni rabemajn tribojn, perforte penetrantajn de nordo, tiel ke ili estis forlasataj de trupoj, unue la antonina muro 184 kaj poste la hadriana muro 195.

Sed ne nur atakemaj eksteraj malamikaj triboj devigis la prokuratorojn al defenda agado, sed ankaŭ internaj romiaj konfliktoj pri la plej alta imperia potenco danĝerigis la pozicion en Britujo, ĉar tiam trupoj estis delegitaj al Romo, kio poste konduku al fiaska fino. Do, la detruon de *Vallum Hadriani* en la jaro 195 kaŭzis la dilemo, kiam la prokuratoro Klodio Albino (*Clodius Albinus*) uzurpis la imperiestrecon, sed vane.

La imperiestroj Septimio Severo (*Septimius Severus*, reg. 193-211) kaj ties filo Marko Aŭrelio Antonio Karakalo (*Marcus Aurelius Antonius Caracalla*, reg. 211-217) enmiksiĝis pri la britaj aferoj, reestablante kaj plifortigante la hadrianan bastionaron. Imperiestro Severo (*Severus*) mortis eĉ en Eburako (*Eburacum*), ĵus kiam li preparis atakon kontraŭ la Kaledonianoj. Tion plenumis lia filo Karakalo (*Caracalla*). Precipe la Meatojn li kruele punis post sia venko. Malgraŭ ĉiuj sukcesoj imperiestro Severo ekkonis la malfacilaĵojn por defendi sin; pro tio li postulis, ke la lokaj triboj rebatu la Kaledonianojn. Tiel li efikis pluajn plenpacajn jarojn en tiu fora romia provinco ĝis 367.

Nova danĝero ekestis fine de la 3a jarcento, kiam ĝermanaj triboj pirate albordiĝis en sudo. Ilin rebatis la uzurpatora imperiestro Karaŭzio (*Carausius*, reg. 287-294) kaj la vera imperiestro Konstantio Ĥloro (*Constantius I. Chlorus*, reg. 305/06). Ĉebordaj bastionoj, konstruitaj dum tiu tempo, ankaŭ protektis la provincon kontraŭ tiuj ĝermanaj invadantoj.

### 6. Eliro kaj fino de la romia epoko

Kun la imperiestro Konstantio II-a (*Constantius II Chlorus*) Britujo por la lasta fojo fokusiĝis en la romia historio. Li, gajninta la cezaran dignon dum la tetrarĥia regno de Diokleciano super la okcidento inkluzive la provinco *Britannia* (305) kaj mallonge poste mortinta en Eburako (306), sukcesis, ke lia filo Konstanteno sekvis lin. Pro liaj propraj meritoj li ricevis la alnomon „La Granda“ , reg. sola 306-337, aboliciante la tetrarĥion. Ili ambaŭ fondis sian gloron en Britujo, kiu, situanta je la plej fora norda rando de la vasta romia imperio, ekgravis kvazaŭ juvelo. Kaj fakte dum la venontaj jardekoj ĝi prosperis. La venko de Konstantio II-a Ĥloro kontraŭ la kaledoniaj Piktoj (306) signalis forton kaj potencon de la romianoj. El iamaj perfortemaj invadantoj fariĝis aliancanoj kaj protektantoj.

Tio evidentiĝis, kiam sinistraj eventoj devigis la forigon de la truparo fine de la jarcento. Kvazaŭ preludo al nova epoko estis la batalo de Adrianopolo (nuna turka *Edirne*) de 375, kiam la ĝermanaj Gotoj venkis tutan romian armeon kaj anoncis danĝeron: do migrantaj popoloj minacis transiri la romian landlimon. Paŝon post paŝo nun ĉiuj trupoj forlasis siajn garnizonojn, fortikaĵojn kaj urbojn, fonditajn de ili.



La hadrianan fortikaĵaron ili malokupis inter 380 kaj 390. (Laŭ la romiaj analoj la jaro 384 precizigas la oficialan demision). De nordo al sudo, de okcidento al oriento ĉiuj romiaj soldatoj elmigre nehaltigeble malinvadis landon, kiu komencis fariĝi vere romiaĵo. Fine de 407 ne sole la lastaj trupoj enŝipiĝis al la kontinento, al Gallio, por defendi la romian ŝtatkoloson je aliaj landlimpartoj, sed ankaŭ la romia regno en Britujo nun definitive ĉesis. La britaj triboj, fidantaj al la ekburĝonanta romia kulturo, nun memstare volis defendi tian civilizadan staton. Sed ili estis inundataj de fremdaj popoloj. El Kaledonio la Skotoj kaj Piktoj enpenetris, kaj veninte trans Germana maro establis sin ĝermanaj popoloj kaj neniigis ĉiun romiecon.

### Epilogo

Memorante preskaŭ kvarcentjaran romian regnon en Britujo, oni ne povas fermi siajn okulojn konsidere al tio, kion efikis romiaj spirito, potenco aŭ regarto. Komence malinkline al ĉiu romieco, la Britoj de tempo al tempo akceptis ĝin, ekkonante ties pli altan kulturon, kaj estis pretaj, integriĝi en la romia ŝtato. Eble ili estus fariĝintaj romianaj popolo kaj ŝtato, se la historia evoluo ne estus abrupte rompiĝinta. La romia invado en Britujo restas memstara historia epoko, ne ligita al la posta historio de la insulo, tute ne apartenanta al tio, kion ni konceptas kiel Britujo aŭ Anglujo. Vere, la nuna ŝtato Granda Britujo ekestis sendepende de la romia invado, kiu restas – ankaŭ por la historiistoj – ekstera fenomeno.

### Kronologio

| | |
|---|---|
| 55 a.K. | (aŭg.) La unua ekspedicio de Cezaro al Britujo |
| 54 a.K. | (jul.-sep.) La dua ekspedicio de Cezaro |
| 43 p.K. | *Aulus Plautius* invadas laŭ imperiestra ordono |
| 47 | *Ostorius* daŭrigas la invadon |
| 52 | Morto de *Ostorius*. Lin sekvas *Didius*, poste *Veranius* kaj *Paulinus Suetonius* |
| 61 | Rivelo de *Boudicca*, reĝino de la Icenoj, kun sia tribo |
| 77 | *Gn.I.Agricola* fariĝas prokuratoro. Dum sep militiroj li subigas la tutan insulon definitive al romia provinco *Britannia* |
| 84 | *Agricola* venkas la Kaledonianojn en la batalo ĉe *Mons Graupius* |
| 93 | Morto de *Gn.I.Agricola* en Romo |
| 122/7 | Konstruado de la *Vallum Hadriani* (remparo de Hadriano) |
| 142 | Konstruado de la *Vallum Antoninum* (remparo de Antonino) |
| 184 | Malokupo de Antonina remparo |
| 195 | Malokupo kaj detruo de la Hadriana remparo |
| ĉ.200 | Restarigo de la Hadriana remparo |

380 Definitiva malokupo de la Hadriana remparo
407 La lastaj romiaj trupoj forlasas Britujon. Fino de la romia okupado

## Nomenklaturo

| Esperanto | Latina | Angla / Franca |
|---|---|---|
| Bodotria golfo | *Bodotria Aestuarium* | *Firth of Forth* |
| Britujo | *Britannia* | *Great Britain* |
| Bulonjo-sur-maro (?) | *Portus Itius* | *Boulogne/sur/Mer* |
| Cezaro | *G. I. Caesar* | *Caesar* |
| Dovera / kaleza markolo | *Fretum Gallicum* | *Street of Dover / Pas de Calais* |
| Graŭpius Monto | *Graupius mons* | *Ben Macdhui* (?) |
| Hibernio | (vd. Irlando) | |
| Irlando | *Hibernia* | *Ireland* |
| Kaledonio | *Caledonia* | *Scotland* |
| Kimrio | (ne tradicia) | *Wales* |
| Klota golfo | *Clota Æstuarium* | *Firth of Clyde* |
| Kornvalo | (ne tradicia) | *Cornwall* |
| Manika kanalo | *Oceanus Britannicus* | *Channel / La Manche* |
| Remparo de Hadriano | *Vallum Hadriani* | *Hadrian's Wall* |
| Tamizo | *Tamesis* | *Thames* |

## Glosaro

**Bronzo** – Metala alojo, konsistanta el 9 partoj de kupro kaj 1 parto de stano. Kvankam tuta kultura periodo estas nomata laŭ tiu metalo (ĉ. 1800 ĝis 800 a.K. en Eŭropo) ĝi estas uzata ankaŭ en sekvantaj periodoj, eĉ ĝis hodiaŭ ekz. ĉe sonoriloj. La antikvaj popoloj ĝin ĝenerale uzis. Tial Britujo gravis pro siaj stanaj kuŝejoj.

***Claudius* (Klaŭdio)** – Romia imperiestro, nask.10 a.K., mort. 54 p.K., reg. 41-54 p.K. Kompleta nomo: *Tiberius Claudius Nero Germanicus*. Sub lia regno la Romia Imperio pliampleksis kun la provincoj Noriko (*Noricum*), Trakio, Maŭretanio kaj Britujo. Li regis severe laŭ romiaj virtoj. Tamen li estis murdigita de sia tria edzino *Agrippina*.

**Diktatoro** – Laŭ la romia konstitucio plenpova kaj plenrajta ofico. Origine ĝi estis kreita por forigi krizan staton, ekz. militon. Ĝi daŭris nur limigitan tempon. Poste li devis retransdoni sian potencon al la senato resp. al la konsuloj (vd.malsupre).

**Druido** – Kelta sacerdoto, precipe en Gallio kaj Britujo. Tiu sacerdotaro estis erudit-aro, ne sole observanta religiajn aferojn, ekz. la viktimservon, sed ankaŭ justicon kaj ĉiujn aliajn kulturajn aferojn.

***Gallia Narbonensis*** – Parto de Gallio, situanta okcidente de la Alpoj laŭ la rivero Rodano (nuna *Rhône*) kaj laŭ la mediteranea pordo. La provinco estis nomata laŭ sia ĉefurbo Narbo (nuna *Narbonne*). Ĝi estis konkerata 125-118 a.K.

***Hadrianus* (Hadriano)** - Romia imperiestro, nask. 76 p.K., reg. 117-morto 138 p.K. Kompleta nomo: *Publius Aelius Hadrianus*. Li rezignis pri plua ekspansio de la imperio, sed opiniis grave defendi la limojn per eminentaj fortikaĵoj, la t.n. limesoj (vd. malsupre) – do, ankaŭ en Britujo – kaj plibonigi la infrastrukturon: stratirado, akvokondukaro. Same li reformis la administradon kaj la militistaron..

**Imperiestro** – Plej alta titolo de regnestro (laŭ PIV), range staranta super reĝo. Tiu signifas regnanto super tre granda regno, do, imperio. Lingve ĝi deriviĝas de lat. *imperium* aŭ *imperatoro* (plenpova komandanto). Respondas al tio la anglaj resp. francaj esprimoj: *emperor* kaj *empereur*. Laŭ la historia scienco tio ne estas pravigebla. Laŭ la romia tradicio ĝi devenas de *G.I. Caesar*, kies posteuloj alnomiĝis *Caesar* (Cezaro). Pro pli bona distingado ni uzas en Esperanto "imperiestro", ĉar "Cezaro" (*Caesar*) estas la propra nomo de *Gaius Iulius Caesar* esperantigita. Pli ekzakte estas la germanaj kaj rusaj esprimoj: *Kaiser* kaj *Caro*, rekte derivataj de *Caesar*.

**Klaŭdio** (vd. *Claudius*)

**Kolonoj de Herkulo** – Antikva nomo de la markolo de Ĝibraltaro. La nomon donis la greka heroo Herkulo (*Herkules* aŭ *Herakles*), mita kaj tre forta persono.

**Konsulo** – Plej alta oficisto de la romia respubliko (dum la antaŭ-imperiestra epoko). Ĉiam regis du konsuloj po 1 jaro: ili estis elektataj kaj nomumataj de la senato (vd. malsupre).

**Legato** – Ordinare komisiito por interŝtataj aferoj, tiuĉikaze por militaj afero; li povas anstataŭi la prokuratoron (vd. malsupre) en lia militista funkcio.

**Limeso** – Tute latina esprimo por fortikigita landlima barilo resp. remparo. La fortikaĵoj konsistas parte el palisaro antaŭ remparo, parte el ŝtona muro. Masonaj gardoturoj kaj firmaj kampejoj sekurigas la gardadon. Ne sole en Britujo troviĝas limesoj, sed ankaŭ en aliaj regionoj limesoj protektis la Romian Imperion kontraŭ malamikaj atakoj je landlimoj. Plej konata kaj plej konservita estas la limeso en suda Germanio.

**Militĉaro** – Dum antikva epoko du-rada ĉaro, tirata de ĉevalo, kun parapeto direktita antaŭen, kiu estas provizita per feraj platoj; dorsflanke la ĉaro estas malferma, tiel ke la militisto, batalanta protektite de la parapeto, povas salti de supre, eble dum la batalo. La militĉaro estis precipe uzata de popoloj ĉirkaŭ Mezopotamio (Asiroj, Babilonanoj, Hetitoj), poste ankaŭ de la Egiptoj kaj Persoj. Ĉu la Keltoj, precipe la Britoj ĝin uzis, estas apenaŭ konata.

**Prokonsulo** – Titolo por konsuloj (vd. supre) post ties oficoperiodo, kiam ili funkciis kiel prokuratoro (vd. malsupre) en provinco, ili observis militestran oficon.

**Prokuratoro** - Guberniestro kaj vice al la imperiestro reganto en provinco, ekipita kun ĉiuj rajtoj de justico kaj militado.

**Romo** - Ĉefurbo de la Romia Imperio kaj ties elirpunkto. Origine la kolosa imperio estis urbo-ŝtato, laŭ mito fondita de *Romulus* kaj *Remus* 753 a.K. (nun regurbo de Italujo).

**Romia / romiano** - Neoficiale (laŭ PIV) enkondukata derivaĵo de "Romo", "roma" - esprimanta romecon resp. ŝtatano de la Rom(i)a Imperio.

**Senato** - Konsilio de nobeluloj, patricioj, lat. *patricii*, precipe leĝdona: la plej alta institucio dum la respublika epoko, kaj poste dum la imperiestra epoko ankoraŭ funkcianta.

**Sumero** - Plej antikva popolo kaj kulturo en Mezopotamio, tie ekzistanta dum la 3a jarmilo a.K. Origino de la sekvintaj kulturoj de la Babilonanoj kaj Asiroj, sed ili ne estis Semidoj.

**Tetrarĥio** - Sistemo de regado, iniciatita de imperiestro Diokleciano ekde 203 p.K. laŭ kiu la imperio estis diskvarigita. Ĉiu parto estis regata de propra imperiestro.

**Triumfo** - Solena agado, origine oferofesto post sukcesa militiro de iu militestro, do triumfanto. Poste ĝi ŝanĝis al solena eniro de la venkinta armeo kun kaptitoj, akiritaĵoj kiel venkotrofeoj en Romo. La senato (vd, supre) devis permesi ĝin. Ĝis tiam la venkinta legio devis atendi antaŭ Romo. La tuta afero estis grandioza kaj pompa festo por ĉiuj urbanoj.

## Fonta komentario

Ĉiuj detaloj de la invado resp. konkerado originas el antikvaj fontoj, faritaj de antikvaj aŭtoroj kaj historiistoj. Ili apogas sin sur eminentuloj kaj sur ĝenerala sciado. Sole Cezaro raportas sian propran agadon. Tacito reliefigas Agrikolon, ĉar tiu estis lia bopatro. Kiel sincera historiisto li garantias objektivan sciigon sen iaj emocioj favore al tiu. La precizaj fontindikoj estas jenaj, kun citaĵoj enkrampigitaj:

*1) G.Iulius Caesar. De Bello Gallico (libro IV ĉapitro 20 etc., libro V. ĉap. 8/23**

*2) Cassius Dio: Historio de Romo (libro LX, ĉapitro 19/22**

*3) P. Cornelius Tacitus: Annales (libro XII, ĉap. 31/40, libro XIV, ĉap. 29/39)**

*4) P. Cornelius Tacitus: De vita Iulii Agricolae liber.**

## Literaturo

### Priliteraturaj indikoj

Krom tiuj supre cititaj aŭtoroj, modernaj historiistoj neglektas la eventon, verŝajne negravan por ili, kvankam estas dubinda, ĉu la nunaj enloĝantoj de Britujo malaprobas ian ajn sciadon pri tiu antikva epoko. Certe ili ne estas la idoj de la keltaj britoj, eble almenaŭ malgrandparte. Do, nur skize ili – jene listigitaj – mencias la romian okupoperiodon. Eĉ *von Ranke* nur per kelkaj linioj traktas tian periodon laŭ sia duvoluma historio de Britujo. Tial ĉiuj literaturaĵoj, tie ĉi indikitaj, enhavas sole proksimumajn kontribuojn uzeblajn. Ĉiuj literaturaĵoj estas verkitaj germanlingve, escepte tiu de *Tacitus*, kiu estas kaj latine originala kaj germanlingve tradukita. Ĝi estas kolekto de antikvaj fontoj kaj pro tio komplete uzebla. (* = Eldonjaro kaj eldonejo ne plu determineblaj pro pruntepreno el biblioteko antaŭ ses jaroj.)

### Literatura listo

*P. Hars*, La darejko. Sortoj ĉirkaŭ ora monero (*Der Dareikos. Schicksale um eine Goldmünze*) 5a novelo: Junulo ĉe la gvardio de *Julius Caesar* (*Ein junger Mann bei der Leibgarde J. Caesars*). *Theiss, Stuttgart*, 1992 (347p.)

*Historia Mundi*, 4a vol: La Romia Imperio kaj la kristaneco (*Römisches Weltreich und Christentum*). *Francke, Bern*, 1956 (611p.)

*(dtv)*-Leksikono de la antikva historio, trivoluma (*dtv-Lexikon der Antike, Geschichte*). *dtv*, 1978 (290, 312, 307p.)

*Meyer* Poŝleksikono pri historio, sesvoluma (*Meyers Taschenlexikon, Geschichte. Bibl.Inst. Mannheim/Wien/Zürich, 1982 (po 320p.)*

*Leopold von Ranke*, Majstroverkoj. Angla historio duvoluma, 1-a vol. (*Meisterwerke: Englische Geschichte, Bd.1*)*

*W. Seyfarth*, Romia historio: La imperiestra epoko, duvoluma 1-a vol. (*Römische Geschichte, Kaiserzeit 1*). *Wissensch. Buchgesellsch., Darmstadt*, 1974 (329p.)

*Tacitus*: La romianoj en Anglujo (*Tacitus: Die Römer in England*)*

*O. Veh*: Leksikono de la Romiaj Imperiestroj (*Lexikon der römischen Kaiser*). *Artemis, Zürich/München*, 1990 (158p.)

*M. Waltari* : *Minutus* la romiano (*Minutus der Römer*). *Weltbild, Augsburg*, 1995 (714p.)

## Adreso de la aŭtoro

*Gerhard KALKHOF* <gerh.kalkhof.ltb@t-online.de>
*An der Ritsch 17*
*DE – 36341 – L a u t e r b a c h* / GERMANIO

## Priaŭtora informo

Emerita instruisto; speciala fako kaj ŝatokupo: historio.



# La ago de la luda funkciado de parolkapablo en planita lingvo

*Constantin DOMINTE*

## Enkonduko

En la bildon, kiun donis al la funkcioj de la parolkapablo *Jakobson* (1958) ne inkluzivis ankaŭ la **ludan funkcion**. Okazo por *Mounin* (1972), kiu konstatis la mankon, demandi sin ĉu la usona lingvisto ne integris reciproke la **ludecon** kaj la **poeziecon**. Kompreneble, inter la ludeco kaj la poezieco estas komunaj punktoj: **la poezieco estas konsiderebla kiel alta speco de ludeco**.

*Jakobson* difinis la poezian funkciadon de la parolkapablo, tiun funkciadon orientiĝanta al la mesaĝo, kun estetika efiko, per la „projekciado de la principo pri la ekvivalenteco disde la akso de la elektado (inter variaj lingvaj elementoj „stokitaj" en la cerbo) sur la akson de la kombinaĵoj (de lingvaj elementoj)". Sed ankaŭ la ludan funkciadon de la parolkapablo oni povus difini per la sama principo, kun du gravaj diferencoj kompare al la poezia fukciado, kaj nome:

1) dum la ago de la poezia funkciado kondukas al la realigo de agrabla mesaĝo, plaĉa al la aŭskultanto, ĝiaj rimedoj de realigo, **belsonecaj**, estante la **ritmo**, la **vortordo**, la **fonetikaj stilfiguroj** (alidire: **sonfiguroj**), elinter kiuj elstaras la **aliteracio** kaj la **rimo**, anstataŭe, la ago de la luda funkciado kondukas al la realigo de **amuza**, eĉ ridiga mesaĝo, destinita malstreĉi la atenton de la aŭskultanto, mesaĝo havanta kelkfoje eŭfemismajn potencojn, destinataj protekti la konvenecojn en delikataj cirkonstancoj, la rimedoj de la realigo de tiu ĉi lasta estante, ĉefe, la variaj specoj de vortludoj;

2) dum la aliteracihavaj kaj rimhavaj vortoj estas projekciataj, per la ago de la poezia funkciado, je iu „distanco" iuj rilate la aliajn sur la akson de la kombinaĵoj, anstataŭe, la samaj vortoj, aŭ aliaj, estas projekciataj, per la ago de la luda funkciado, kelkfoje preskaŭ en unu saman punkton, malpli ofte eĉ en unu saman punkton sur la akson de la kombinaĵoj.